

ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »


Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux



Prezidanto : Joël LAJUS
1 Les Places
33910 SABLONS DE GUITRES
Tel : 05 57 69 26 96
Mail : lajus.joel@wanadoo.fr

Sekretario : vaka posteno

Kasistino : Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr



La « Espéranto-Gironde » Informilo

FEBRUARO 2012



N° 130

BONVOLU NOTI SUR VIAJ NOTLIBROJ
LA ĈI SEKVAN RENDEVUON



La Roumanie

à travers mes récits



Rodica TODOR
Psychothérapeute

à Braşov (Transylvanie)

Samedi 31 mars à 16 h
Centre culturel Palmer - CENON



Vidu paĝo 5...



Varmis niaj koroj

Varmis niaj koroj, eĉ se la suno sin kaŝis, eĉ se la banderolo « BONVENON » ne povis esti fiksata la antaŭan tagon, eĉ se la kuskuso transŝanĝis en sarlatajn terpomojn kun anasfemuroj. Pri tio, ni petas de nove vian indulgon !

Unue, Marcelo prezentis al Espéranto-Gironde la tabelon de la partoprenado en la kongreso organizata de UFE kaj IFEF dum majo 2013 en Artigues près Bordeaux. Ŝajnas ke estas jam bona farita laboro.

Poste Joël omaĝis al Zamenhof antaŭ la publiko kie troviĝis la urbestro kaj la vicurbestro. Mi ne forgesu ke ili kaj la tuta konsilantaro signis la peticion por Esperanto en bakalaŭrezkzameno.

Okaze de miaj 80 jaroj Joël resumis mian fidelecon al Esperanto kvankam mi travivis periodon dum Esperanto duonripozis. Feliĉe tiu periodo ne estis la teatra, pri kiu Marcelo rakontis mian partoprenadon kun la karaj Kompanoj. Tre emocia momento por mi.

Li enmetis vergeton en la manojn de Adamo kaj diris al li, ke por ricevi kion al li plej bone konvenus sufiĉos per ĝi frapi la maron. Adamo senprokraste ekprovis : li etendis la vergeton super la vastan salan akvon ; subite li ekvidis ŝafinon malmergiĝi.

- *“Jen kio bonas : la ŝafino restados ĉe ni, ni de ĝi ricevos lanon, fromaĝojn kaj lakton.”*

Eva vidinte la aspekton de la ŝafino aspiris al io pli bona. Du ŝafinoj, ŝi opiniis, pli valoros ol nur unu. Ŝi do petis sian edzon lasi ŝin frapi siavice. Adamo, (tion ni scias, je nia malfeliĉo), povis nenion rifuzi al sia edzino. Eva ricevis de li la vergeton kaj ĝin etendis super la maron ; tuj aperis malafabla besto, lupo, kiu, impetinte sur la ŝafinon forportis ĝin al la apuda arbaro. Je la doloraj krioj de Eva, Adamo reprenis la vergeton ; li frapis : hundo persekutis la lupon kaj revenis portante la sangantan ŝafinon.

Granda tiam estis la ĝojo de niaj unuaj pragepatroj. Hundo kaj ŝafino, diras la Libro, ne kapablas vivi sen homa akompano. Kaj ĉiufoje kiam Adamo kaj Eva uzis la vergeton, novaj bestoj elmariĝis : sed kun tiu diferenco, ke Adamo aperigis domajn bestojn, Eva sovaĝajn, kiuj kiel la lupo, sekvdadis la vojon al la arbaro.

Inter la lastaj troviĝis la vulpo, rufhara, nature malbonfarema kaj sufiĉe inteligenta por trompi ĉiujn bestojn en la mondo. La vulpo kurioze similis tiun majstron, nomitan Renardo, kiu spertiĝis pri ĉiaj specoj de perfidaĵo, kaj kiu ankoraŭ nun donas sian nomon al ĉiuj kiuj lernadas trompon kaj mensogon. Renardo ĉe homoj egalas la vulpon ĉe bestoj ; ili dividas saman naturon : samajn inklinojn, samajn kutimojn : ili do povas interŝanĝi siajn nomojn.

Nu la onklo de Renardo estis Sinjoro Izengreno, sangavida kaj perfortema viro, mastro de ĉiuj kiuj vivtenas sin per morto kaj rabo. Tial en niaj rakontoj la nomoj de la lupo kaj de Izengreno samas.



LA ROMANO DE RENARDO

*Anonima prafrancilingva originalo modernigita de A.Paulin (1860)
Tradukita de la cenona tradukteamo (Monique Dussenty, Claudine
Pomirol, André Arnold, Marcel Redoulez)*

PROLOGO

*Kie oni ekscias kiel la vulpo kaj la lupo ekvivis sur tero kaj
kial la unua nomiĝos Renardo kaj la dua Izengreno.*

Moŝtoj, vi jam certe aŭdis rakonti multajn historiojn : oni parolis al vi pri Pariso, kiel li forrabis Helenan, kaj pri Tristano, kiel li verkis la eposon Kaprifolio ; vi scias la diron pri la Lino kaj la Ŝafino, multnombrajn fablojn kaj ĝestojn ; tamen vi ne konas la grandan militon neniam finontan inter Renardo kaj lia kunulo Izengreno. Se vi volas, mi diros al vi kiel la kverelo komenciĝis kaj antaŭ ĉio, kiel ekvivis sur tero ambaŭ baronoj.

Iam mi malfermis sekretan ŝrankon kaj tie mi bonŝance trovis libron traktantan la ĉasadon. Granda vermiljona litero kaptis mian atenton : tie komenciĝis la vivrakonto de Vulpo. Se mi ne ĝin legus mi traktus ebria la homon, kiu rakontus ĝin al mi ; sed respektendas skribaĵo kaj, tion vi scias, kiu ne fidus librojn, tiu riskas malbonan finon.

La libro do al ni diras, ke la bona Dio, post kiam li tiel punis niajn unuajn pragepatrojn, kiel ili tion meritis, kaj tuj post kiam ili estis forpelitaj el Paradizo, ekkompatis pri ilia sorto.

- - la kanzonoj ĥore kantitaj de ĉiuj (la Komunumo kaj Brassens)
 - la deklamo de Bernardo
 - la gitaro de Thierry
 - la lumbildoj de Marcelo kaj Claudine
- « okulorele » agrabligis nin.

Ni revidis kun plezuro Gisèle Ghizard kaj ŝiaj grupanojn, ne atenditajn.

Krome vi tro donacis al mi : librojn, ŝalon, florojn, olivarbon. Ĉu vi bone aŭdis ? Jes, la arbo de la paco kiun mi salutas ĉiu matene, en esperanto kompreneble. Kia maniere danki vin ?

Dankon al Internacia Amnistio kiu ankaŭ subskribis la peticion, kaj pasigis agrablan momenton kun ni.

Dankon al tiuj kiuj preparis la dekoracion, la aperitivon, la manĝon, aparte al Josette kaj ŝiaj infanoj kaj amikoj.

Dankon al miaj filino kaj nepino.

Dankon al ĉiuj kiuj ne povis veni, sed tamen esti kun ni per la penso.

Sabine

POST LA NUKLEA KATASTROFO EN JAPANIO

* * * * *

BELA TAGO EN MARGUERON

* * * * *

Estis malvarme ekstere. Sed interne de la vilaĝa salono kie ni kunvenis tiun-ĉi decembran dimanĉon, ŝvebis dolĉa varmo, en la aero sed ankaŭ en niaj koroj.

Centre de la tagordo de nia Zamenhof-tago estis nia amikino Sabine. Ĉiuj venis – proksimume 30 personoj – por honori ŝin. Fakte, okaze de ŝia datreveno, nia asocio festis ŝin kaj dankis ŝin kiel fidela kaj sindonema membro; ankaŭ kiel partopreninto, ek de 20 jaroj, en nia artistita trupo « La Kompanoj ». La vilaĝa urbestro ĉeestis kaj parolis, same kiel iu respondeculo de la loka grupo de « Amnesty International ». Ni kune tintigis la glasojn honore al Zamenhof, honore al Sabine kaj je la sukcesa estonteco de la internacia lingvo .

Post la kooperativa manĝado – ni multe dankas Josette, sindonema amikino de Sabine, pro ŝia varma plado kaj ŝiaj bongustaj boletoj !..—ni kune kaj ĝoje kantis ; Thierry akompanis nin per sia elektra gitaro. Ankaŭ, ni plezure aŭskultis Marcel kaj Claudine kiuj ekpreparis, helpe de bildoj, prezentadon de Bordozo cele al la internacia E-kongreso okazonta en Artigues en 2013 .

Estis vera bela tago por Esperanto kaj, espereble, por ĉiuj ĉeestintoj.

Joël



Eble vi memoras pri Hori kaj Bin, du japanaj esperantistoj, kiuj vizitis nin antaŭ du jaroj, okaze de turneo tra Francio. Por nia grupo, ili faris tre interesan animadon en Libourne .

Hori loĝas sufiĉe proksime de Fukuŝima, kaj, ek de la ampleksa katastrofo, li regule sendas raporton al la esperantistaro, pere de Esperanto-France,

Laŭ li, meze de Februaro, la statistikoj estis jenaj: 15848 mortintoj, 3305 malaperintoj kaj 341411 rifugantoj. Li verkis: « La 11an de Februaro, la 11-monata datreveno de la katastrofo, okazis granda manifestacio en Tokio kun la partopreno de 12000 homoj. Tiu estis la tria manifestacio organizita de la nobel premiita verkisto Ooe Kenzaburo kaj aliaj. En tiu tago, en la tuta Japanio, okazis multaj manifestacioj kontraŭ la atomcentraloj. »

Pluraj movadoj, en diversaj lokoj de la lando, batalas petante la mal-konstruon de atomcentraloj.

Verŝajne, la 11an de Marto, okaze de unujara datreveno de la katastrofo, multaj japanoj, en la tuta lando, surstrate amase grupiĝos. Ankaŭ tra la mondo kaj ankaŭ ĉe ni estos planitaj manifestacioj; en Bordozo, ni rendevuos proksime de la Ŝtonponto, je la 14a horo kaj duono .

Tiamaniere, ni perpanse rilatos kun niaj japanaj amikoj kaj kun ĉiuj suferantaj japanoj.

Joël

REALVOKO AL KOTIZOJ

| | |
|-------------------------------------|------|
| ESPERANTO-GIRONDE (individua) | 17 € |
| (paro) | 23 € |
| SAT-AMIKARO | 35 € |

Dankon de la kasistino

Dum tiu dimanĉo la 26an de Februaro 2012
la ĝirondia trajneto ekfajfis



La sekreto de la magia trajneto

Temas pri nova spektaklo de la Kompanoj.

Laŭ ideo de Marcelo kiu, de pluraj jaroj, verkis poemojn pri trajnoj (Kajto jam enmuzikigis kelkajn), nia ĝirondia artista trupo nun preparas prezentadon cele al la internacia kongreso de IFEF (Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj). Tiu kongreso kiu, samtempe, estos tiu de Esperanto-France, okazos en Artigues apud Bordojo komence de majo 2013.

La magia trajneto estas bela rakonto kiu naskiĝis en la revoj de infano.

Dek-kvin da gesamideanoj jam kunvenis por elekti la prezentotajn tekstojn kaj proponi tiujn kiuj estas deklamotaj aŭ kantotaj. Ek de nun, du muzikistoj estas laborantaj por inventi muzikojn. Restas pli ol unu jaro por pretigi la aferon: ruli la magian trajnon per sekuraj reloj ĝis la kongresa scenejo!...

Kia entuziasmiga laboro!...

Joël

Ni vizitos RUMANION kune kun RODICA TODOR

Laŭ historia, geografia, politika, socia kaj kultura vidpunktoj.



Ni kalkulas pri via helpo por diskonigi tiun eventon kaj partopreni en la diskuto.

Ni samtempe memorigas al la kongres-helpantoj ke ni planas, la saman tagon, t.e. sabaton la 31an de marto, vizitigi al Rodica la MPS (Maison de la Promotion Sociale) en Artigues je la 10a horo kaj ke okazos kongres-kunveno en la kultur-centro je la 11a horo.

La partoprenontoj kunportu sian manĝon.



Micheline,

Dum Januaro, Claudine Demontoux, la filino de nia amikino Micheline, mortis pro malsano. Multaj personoj, multaj gekolegoj el la instrua medio, ĉeestis la funebran ceremonion en la kremaciejo de Montussan. Ni estis pluraj geesperantistoj por emocii kisi kaj kuraĝigi Micheline.

Joël

Pri prelego : Brassens en esperanto

Mi estis invitita prezenti prelegon pri Brassens en esperanto en Nantes okaze de la ĝenerala asembleo de la loka esperanto-grupo Centre Culturel Nantes-Esperanto (CCNE) dimanĉon la 22an de januaro. La preparado de tiu prezento estis por mi okazo kolekti kaj klasifiki arkivojn, trovi amikojn malgraŭ de longe ne plu aktivaj kontaktoj, esplori kelkajn novajn spurojn... Post intensa laboro mi ne malkontentis pri mia afero sed fine mi pretus animi tutan semajnfino laŭ la temo ! Mi do nepre devis koncizigi la tuton...

Trideko da geesperantistoj kuniĝis post aktiva matena kunveno por dormetante luliĝi laŭ miaj paroloj. Antaŭ ol komenci mi aludis pri la tradukado de la kantoj de Oĉjo Georgo en aliajn diversajn lingvojn kaj pri la arto traduki en esperanton. Mi anoncis, ke mi ne tro parolos pri Brassens, fama kanzonisto, antaŭ franca publiko sed pli pri, unue la esperantistajn tradukintoj kaj due la esperantistajn kantintojn. Por ĉiu de mi konata tradukinto estis prezentita lumbildo kun foto(j), naskiĝ-jaro (kaj eventuale mort-), kaj titolo de lia(j) traduko(j). Kelkaj vortoj pri ĉies vivo aŭ anekdotoj rilate la tradukojn kompletigis la prezenton. Same pri la kantintojn, kun kompreneble speciala mencio pri la teatraĵoj de nia trupo 'La Kompanoj'. La lumbildaron ilustris sonekstraĵoj. Senprobleme Olivier Tzaut, Ĵak LePuil kaj Jacques Yvart konsentis. Ankaŭ la virinoj de la vilaĝo, kiuj speciale por la evento troviĝis ĉirkaŭ Margoto, por registri la katoscenon de nia spektaklo « Vizito ĉe Oĉjo Georges ».

La videokromaĵo sur la KD « Brassens plu » ebligis paroli pri la grava situacio de Vinilkosmo post incendio kaj instigi al esperantistoj tie mendi favorprezajn KDojn.

Kompreneble, laŭ tradicio de la Kompanoj, ni finis per komuna kantado de 'Tuj la Kompanar' ! Dankojn al gastemaj Jean kaj Raymonde Ripoché kaj al ĉiuj aliaj aŭskultintoj. Dankon al Claudine pro ŝia amoplena pacienco. Tiun prezenton mi publike dediĉis al Monique Loubière, Kompanino el Nantes, kiu tro frue forlasis la ferdekon...

Marcelo



*Marie-Rose Sarlandie kaj Monique Dussenty
Margoto konsolita de Maria Padilja del Sol'*

PS. Post tiu prelego mi preskaŭ hazarde eksciis pri la ekzisto de alia tradukinto kun novaj tekstoj... kaj vi, ĉu vi neniam tradukis Brassens en esperanton ? El liaj pli ol ducent kanzonoj malpli ol tridek estas hodiaŭ kanteblaj en esperanto... Mi volonte pli-grandigos mian kolekton dank'al vi !